## SOLVO


La respondo de la lasta kvizo estas

**HELSINKI**



## KVIZO


**Ĉu vi bone konas Eŭropon?**



Mi estas ĉefurbo proksimume 900 kilometrojn for de Roma, 1,300 de Berlin, kaj 1.800 de Paris.

**Kio estas mia nomo?**

## POMO



Pomo, pomo,
Bela nomo,
Dolĉa frukto vi;
Se mi estus reĝo,
Mi sidus sur seĝo,
Kaj manĝus pomojn tri!

## LA HISTORIO DE FOULNESS

Arkeologie, la unua setlejo estis dum la Romian-Brita epoko sed tiu ne estis longdaŭra.

Ekde la mezepokaj jarcentoj, la loĝantaro kreskigis la insulon per marmuroj dum kvin fazoj. La lasta etapo en la kreskigo, oni finlaboris nur en 1833.



Je la komenco de farmado sur la insulo, ŝafoj estis la ĉefa produkto. Tamen malrapide agrikulturo anstataŭis ĝin kaj estiĝis la plej kutima speco de farmado.

En la lastaj jaroj de la deknaŭa jarcento preskaŭ 800 homoj loĝis tie. Dum la unua mondmilito, la proprietulo vendis la insulon al la ministerio de milito kaj ekde tiam la armeo uzis la insulon kiel provterenon por artileriaj armiloj, bomboj kaj obusoj.



Iom post iom la loĝantaro malpliiĝis. Nun mankas al ili eĉ drinkejo kaj lernejo.

Nuntempe oni uzas la malnovan renovigitan lernejon kiel multinforma centro por vizitantoj.

Resumis kaj tradukis
Mark Drake

Orientlondona

# Orientlondona Esperanto

*(East London Esperanto)*

***Bulteno/Newsletter***

*http://www.greenrats.org.uk*

*Julio ĝis oktobro 2015 July to October*

*Antaŭe la Ilforda Esperanta Societo, originale fondita en junio 1904*
*Formerly the Ilford Esperanto Society, originally founded in June 1904*

## FEDERACIA VIZITO AL FOULNESS

Dimanĉon la 6an de septembro du el nia anoj, Mark Drake ka Roy Simmons partoprenis viziton al la insulo Foulness, organizita de Roy Threadgold, prezidanto de la Orienta Federacio. La insulo apartenas al la armeo, sed la unuan dimanĉon en ĉiu monato inter aprilo kaj oktobro, eblas viziti kaj vojaĝi ĉirkaŭ la insulo pere de speciala veturilo montrita en la dua foto. La seĝoj estis farita el pajlo.







Proksimume du cent homo loĝas sur la insulo nuntempe, kaj la preĝejo estas impona, kvankam nur Viktoriana. Nia vojaĝo malantaŭ la traktoro estis interesa. Tritiko estas la ĉefa kreskaĵo, kaj estis rikoltata dum ni estis tie. Por atingi la insulon estas nun moderna ponto, sed la kvara foto montras la 'Broomway,' kiu estis la sola vojo sur la insulon ĝis la ponto estis konstruata.

La antaŭa lernejo estas nun muzeo, ka tie lokaj voluntuloj bonvenigis nin, kaj malfermis kafejon, kie oni povis aĉeti kafon, teon, kukojn, ktp. La tago estis suna ka varma, kaj estis ĝojo ripozi en la muzea ĝardeno trinkante kaj babilante antaŭ ol hejmeniri. Bonega tago por ĉiuj.





*Sekretario: 'Esperantujo', 12 Packard Place, Bramford, Suffolk, IP8 4HA,*
*Tel. 01473 461346 , retadreso: rokeby@globalnet.co.uk*

# Kunvenoj en julio ĝis oktobro

**mardo la 7a de julio**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**13a de julio/July 13th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 21a de julio**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**27a de julio/July 27th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 4a de aŭgusto**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**10a de aŭgusto/August 10th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 18a de aŭgusto**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**24a de aŭgusto/August 24th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 1a de septembro**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**mardo la 8a de septembro**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**14a de septembro/September 14th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 22a de septembro**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**28a de septembro/September 28th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 6a de oktobro**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**12a de oktobro/October 12th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

**mardo la 20a de oktobro**
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

**26a de oktobro/October 26th**
**Interreta Grupkunveno**
**Internet Group Meeting**

# July to October Meetings

**Grupkunvenoj/Group Meetings**
**okazas 7.30 - 9.00 ptm**
**pere de la interreto kaj Skype**
**Novaj partoprenontoj kunligu antaŭe** kun **Marko Drejko** aŭ **Roy Simmons** por **esti en la grupo.**

**Studrondo interreta**
**(nur Esperantlingve)**
**okazas 8.00 - 9.00 ptm**
**pere de la interreto kaj Skype.**
**Ni legadas** 'La Mastro de l'Ringoj,"
de J R R Tolkien (tradukita de W Auld)

**When they occur, Beginners' Groups take place at a mutually convenient time and place.**

Se vi deziras partopreni niajn retkunvenojn pere de Skype, vi devas unue ligi kun unu el la anoj, kiu estras la kunvenon. Vi tion faru per la entajpo de la nomo...

aŭ **Roy Simmons**
aŭ **Marko Drejko**

kaj la sendo de mesaĝo kiu petos kunligon. Ni respondos, kaj vi estos kunligita. Ni ne devas fari tion denove. Poste, kiam vi deziras partopreni, voku unu el ni kaj ni aldonos vin al la konversacio.

**Bonŝancon!**

# LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO

**La Londona Esperanto-Klubo** kunvenas ĉiuvendrede ĉe la Irlanda Centro, Camden Square. La programo komenciĝas je la 7.15 ptm, sed estas ŝanco renkontiĝi en la drinkejo antaŭe por babili. La Londona Klubo estas fondita en 1902, kaj kiam vi ĝin vizitas, vi ĉiam havas ŝancon renkonti eminentajn Esperantistojn, kaj britajn kaj forajn.



**The London Esperanto Club** meets every Friday at the Irish Centre in Camden Square. The programme starts at 7.15pm, but there is a chance to get together for an informal chat in the cosy bar beforehand. The London Club was founded in 1902, and when you visit it you always have a chance of meeting eminent Esperantists, both British and from abroad.





www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek

# La Orienta Esperantista federacio



*havos*
***aŭtunan kunvenon***
**ĉe la Kvakeradomo**
**Butts Lane, Maldon, Essex**
**la 31an de oktobro**
**11.00 atm ĝis 5.00 ptm**
***Tagmono £5***

http://www.greenrats.org.uk/oef.htm

# Internacia Amikeca Renkontiĝo

**The Friars, Aylesford, Kent**

**9a ĝis 12a de oktobro**
***(aŭ parto de la semajnfino)***



Por aliĝilo kaj pli da detaloj kontaktu:

Anica Page, 7 Hampton
Great Holm, Milton Keynes
MK8 9EP
Tel: 01908 564004